

Naskigloko de Samuel de Champlain fondinto de Quebec

Meze de la Atlantika marbordo, inter la riveroj Seudre kaj Charente ĉarma vilaĝo kuŝas ĉirkaŭita de fortikaj muroj. Jam de malproksime oni ĝin vidas starantan super la marĉoj. Vojetoj serpentumas al ĝi transpasante kanalojn kaj kanaletojn. La bruoj ne kuraĝas tro laŭtiĝi kaj nur aŭdiĝas la krioj de la akvaj birdoj.

Eĉ dum la Mezepoko Brouage ludis gravan komercan rolon. Bone ŝirmita ĉe la plej interna parto de la tiama plej bela franca haveno, tiu vilaĝo estis « la ĉefurbo de salo » kolektita en 8000 hektaraj salmarĉoj kaj senditaj al Flandrio kaj Germanio. Tie, en 1567 naskiĝis de protestanta familio, Samuel de Champlain, kiu, kvardek unu jarojn poste fondis Québec kaj estis guberniestro de franca Kanado ĝis sia morto en 1635.

En 1638, la protestantoj en la Rochelle rezistis Richelieu kaj Brouage, nur 40 km de la fortika urbo, fariĝis la armilejo de la reĝa armeo. Oni rekonstruis la remparojn kaj post dek jaroj Brouage entenis 6000 homan garnizonon ; ĝi estis la plej fortika loko sur la tuta atlantika marbordo.

Tiel forta ĝi estis, ke dum la ribelo de la nobeluloj, la Frondo, Du Dognon, guberniestro de la urbo sin deklaris suvereno de Brouage. Mazarin, la tiama ĉefministro, donacis 100.000 eskudojn al la ribelulo kaj mem fariĝis guberniestro de la urbeto.

Sed fine de la 17a jarcento Brouage malgraviĝis. La fondo de nova arsenalo kaj haveno en Rochefort deprenis parton de ĝia milita rolo. La haveno de Brouage iom post iom ŝlimiĝis kaj la salmarĉoj fariĝis nesalubraj marĉoj.

Loĝis tie nur malgranda garnizono, kiam, dum la Revolucio, oni tie enkarcerigis neobeantajn pastrojn.

En 1659, Ludoviko la dekkvara kaj Marie Mancini, nevino de la ĉefministro Mazarin, amis unu la alian. Ili estis 20 jaraĵoj kaj deziris geedziĝi. Sed Mazarin deziris konfirmi la pacon inter Fran-

BROUAGE

cio kaj Hispanio per geedziĝo de Ludoviko kaj Maria Teresa, filino de la hispana reĝo. Marie Mancini estis ekzilita en La Rochelle, kaj poste iris al Brouage por kaŝi sian ĉagrenon. Dum kvar monatoj ŝi tie suferis, melankolie promenante sur la remparoj, rigardante la maron, legante Senekon kaj Filostraton. Oni diras ke, kiam Ludoviko sendis al ŝi hundidon, filon de « Friponne », hundino plej ŝatata de li, ŝi eĉ ne respondis la leteron alportitan kun la hundido. Tiam Mazarin permesis al ŝi reveni al Parizo. Ses monatojn poste Ludoviko kaj Maria Teresa geedziĝis en Saint-Jean-de-Luz apud la franca-hispana landlimo. Revenante, Ludoviko forŝoviĝis kaj iris al Brouage, kie li loĝis en la ĉambro antaŭe okupita de Marie Mancini kaj promenis sur la remparoj.

Se vi vizitos Brouage, vi povos admiri la plej belan ekzemplon de la milita arto antaŭ Vauban. La muroj estas 13 metrojn altaj kaj traboritaj de du grandaj pordoj. La korbelturoj estas gracie delikataj. La pli granda nombro el la tiamaĵ domoj malaperis. Sed oni ankoraŭ povas vidi la Domon de la Guberniestro (kie loĝis Marie Mancini kaj Ludoviko la 14a), la kazernojn, la forĝejojn, la armilejojn, la provizejojn. Konstruita komence de la 17a jarcento la preĝejo, senornama kaj severaspekta, estis riparita dank'al la financa helpo de la urbo Québec.

Sed, karaj legantoj, vizitante Brouage, ne forgesu la malfeliĉan Marie !

*Kaŝobservejo
sur la remparoj*

